

**LA IDO DE LA HOMO KOLEKTOS DE LA EKSTREMOJ DE LA ĈIELO KAJ DE LA TERO SIAJN ELEKTITOJN - Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Marko 13, 24-32**

**En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:**

**„En tiuj tagoj, post tiu aflikto, la suno mallumiĝos,  
kaj la luno ne plu donos sian lumon;  
la steloj falos de la ĉielo,  
kaj la potencoj kiuj estas en la ĉielo estas renversitaj.**

**Tiam oni vidos la Idon de la homo venanta sur la nubojn kun granda potenco kaj gloro. Li elsendos la anĝelojn ĉiudirekten kaj kolektos de la ekstremo de la tero ĝis la ekstremo de la ĉielo siajn elektitojn siajn elektitojn.**

**De la fig-arbo lernu la parabolon: kiam ĝiaj branĉoj jam moliĝas kaj ekaperas folioj, vi scias, ke la somero estas proksima. Tiel same, kiam vi vidos, ke tiuj aferoj okazas, sciu, ke ĝi estas proksima, ĉe la remparo. Laŭ la vero Mi diras al vi: Ĉi tiu generacio ne forpasos antaŭ ol ĉio ĉi okazos. La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne pasos for. Sed pri tiu tago kaj horo neniu scias, nek la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro.“**

La ĉapitro 13-a de la Evangelio dei Marko estas tre malsimpla. L'evangeliisto mem konscias pri tio, tiel ke en versiklo 14 li diras "kiu legas", la leganto, "komprenu".

Ni do klopodu kompreni, kion la evangeliisto konigas al ni. ... *En tiuj tagoj, post tiu aflikto ...* la aflikto estas la detruo de la templo kaj de Jerusalemo, kion Jesuo anoncis. Kaj ĉi tie Jesuo, paŭsante la tekstojn de la profetoj, precipe de Jesaja, uzas la saman profetecan stilon kiel pri la falo de la subpremaj regadoj.

Kaj Jesuo diras: *"la suno mallumiĝos, kaj la luno ne plu donos sian lumon"*. La suno kaj la luno en la tiutempa kulturo estis dioj adorataj de la paganaj popoloj. Sekve, la paganaj dioj ne plu brilas. Kial? Jesuo diris antaŭe "Estas necese, ke la evangelio, la bona novaĵo, estu anoncita al ĉiuj". Do la liberiĝo. Komencita per la falo de Jerusalemo, progresas. La anonco de la bona novaĵo, per la lumo kaj la brilo de la vera Dio malheligas ĉiujn diojn malverajn.

Kaj jen la efikoj:

*"la steloj falos de la ĉielo"*. Kio estas la "steloj"? Tiutempe ĉiuj posedantaj iun povon, la reĝo, la imperiestro, la faraono, opiniis sin diecaj, tial loĝantaj en la ĉielo kvazaŭ steloj.

Do Jesuo, per la vortoj de la evangeliisto, asertas, ke ĉiuj tiuj reĝimoj, tiuj potenculoj, kies povo dependis de falsaj dioj, kiam estas anoncita la evangelio de Jesuo, tiuj falsaj dioj perdas sian brilon kaj tiuj steloj falas unu post la alia.

Ĉi tie Jesuo memorigas la orakolon kontraŭ Babilono de profeto Jesaja, kiu admonis la reĝon de Babilono dirante: Kial falis de la ĉielo vi, astro de la mateno, filo de la aŭroro? Vi estis dironta 'mi leviĝos ĝis la ĉielo' kaj male vi estos subenpuŝita en la inferon."

Do la pozitiva efiko de la bona novaĵo anoncita de Jesuo estas, ke ĉiuj strukturoj de la povo, ĉiu reĝimo bazita sur la povo, falos pro la liberiĝo de la homo.

*"kaj la potencoj kiuj estas en la ĉieloj estos renversitaj"*. Laŭ Marko en la ĉieloj estas la Patro, la Ido de la homo kaj la anĝeloj La potencoj estas povoj uzurpantaj la dian kondiĉon, kaj ili ekrenversiĝas.

Poste Jesuo certigas: *"Tiam oni vidos..."*. Li ne diras "vi vidos", sed "oni vidos". Kiu vidos? La potenculoj forigitaj de siaj tronoj, "... la Idon de la homo venanta sur la nubojn ... la nuboj simbolas la diecon. "kun granda potenco kaj gloro". En la sama momento, kiam la potencoj estas renversitaj, la steloj ekfalas kaj ekaperas la potenco kaj gloro de la Ido de la homo.

Jesuo pludiras, ke "... Li

"*Li elsendos la anĝelojn...*", nome tiujn kiuj Lin helpis en la realigo de Lia agado, "*...kaj kolektos... siajn elektitojn*". La falo de la persekutintoj estos la triumfo de la persekutitoj "*... de la ekstremo de la tero ĝis la ekstremo de la ĉielo.*" Ĉio ĉi por nova komenco..

Kaj plu: "*De la fig-arbo...*" Tiu planto jam aperis en tiu evangelio kiel simbolo de la templo, de la religia institucio, kiu estis belega sed ne fruktodona, kovrita per folioj sed senfrukta.

Ankoraŭ plu: "*Lernu la parabolon*". Ĝi estas aparta parabolo; ni povus traduki "tiun parabolon". Sed, kiun parabolon?. La parabolon kontraŭ la religia institucio, la ĉefpastroj, pri la murdintaj vitkultivistoj, de kiuj Dio forprenos la vitkampon.

"*kiam ĝiaj branĉoj jam moliĝas kaj ekaperas folioj, vi scias, ke la somero estas proksima*". Nun Jesuo turniĝas al siaj disĉiploj: "*kiam ĝiaj branĉoj jam moliĝas kaj ekaperas folioj, vi scias, ke la somero estas proksima. Tiel same, kiam vi vidos, ke tiuj aferoj okazas, sciu, ke ĝi estas proksima, ĉe la remparo. Kio estas proksima? Kio estas ĉe la remparo? La Dia regno. Ekde kiam falas Jerusalemo kaj la templo, tiu granda obstaklo kontraŭ la predikado de la bona novaĵo ankaŭ al la paganoj, ekde kiam, per la anonco de la bona novaĵo, ĉiuj povoj ligitaj kun la regado, kun la ekspluatado de la homo, ekfalas, tiam jen malfermiĝas la regno de Dio.*

Kaj Jesuo trankviligas: "*Laŭ la vero Mi diras al vi: Ĉi tiu generacio ne forpasos antaŭ ol ĉio ĉi okazos*". Ni scias, ke Jerusalemo estis detruita en jaro 70. La detruo de Jerusalemo ebligos la eniron de la paganoj en la Dian regnon. *La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne pasos for.* Estas absolute certe, ke se la kristanaro anoncas kaj mem vivas la bonan anoncon de Jesuo, ĉiu maljusta kaj subprema sistemo disfalos, ĉar la piedoj de ĉiuj potenculoj, de ĉiuj reĝimoj estas argilaj, kaj pli aŭ malpli frue ili kolapsos.

Kaj ĉi tiu ĉerpaĵo finiĝas per esprimo de granda fido: "*Sed pri tiu tago...*" la tago de la morto de Jesuo "*... kaj horo...* la horo de la persekuto kaj morto de liaj disĉiploj "*...neniu scias, nek la anĝeloj en la ĉielo, nek la Filo, sed nur la Patro.*"

Kion intencas diri Jesuo al ni? Ne gravas, ke ni konu la momenton, sed ke ni scias, ke ĝi estas en la manoj de la Patro. Do la konkludo de la paĝo estas invito al plena fido en la ago de la Patro. Do la paĝo estas plene pozitiva, certe

ne timiga, sed liberiga, kaj kuraĝiga por la malgranda kredantaro, senpova antaŭ la senkompataj reĝimoj regantaj la mondon.